# TESTO

*Elektu el la kvar proponoj la gramatike kaj leksike ĝustan solvon kies literon bv. enskribi en la skemon, troviĝanta fine de la testo.*

**1) Mia amiko lernas............ .**

**A**: la Esperanton — **B**: multan lingvon
**C**: la internacian lingvon — **D:** nenion lingvon

**2) La leciono pri Esperanto daŭras ........... .**

**A**: unu horon kaj dek tri minutoj — **B:** unu horon kaj tridek minutojn
**C**: unu horon kaj dek tri minuton — **D:** unu horo kaj tridek minutoj

**3) Kiam mi estis malsana, mi prenis medikamentojn ..................... .**

**A**: duoble tage — **B:** dufoje tage
**C**: dum du tagojn — **D:** tra du tagojn

**4) Ĉampiono de la konkurso estas tiu, kiu kuras.................. .**

**A**: la pli rapide — **B:** plej rapide
**C**: la plej rapide — **D**: pli rapide kiel ĉiuj

**5) La eks-edziniĝinto estas ....................... .**

**A**: virino, kiu jam ne havas edzon — **B**: virino, kiu ne havis edzon
**C**: viro, kiu jam havis edzinon — **D**: viro, kiu ekhavis edzinon

**6) Se mi malbone ekzameniĝos, mi ne .......................ricevi mian diplomon.**

**A**: devas — **B**: scios
**C**: povos — **D**: eblas

**7) Hieraŭ la leciono ..............................malfrue.**

**A**: komencos — **B**: komenciĝos
**C**: finiĝis — **D**: finis

**8) Jozefo ne forveturis, ĉar la patrino forgesis ....................... .**

**A**: vekiĝi lin — **B**: vekis lin
**C:** vekigis lin — **D**: veki lin

**9) Jozefo konsilis al Maria, ke ŝi bonvolu ................. bone.**

**A:** farti ŝin — **B**: fartu sin
**C:** fartu — **D**: farti

**10) Parolu malrapide, mi ............................................................. .**

**A**: komprenis nenion — **B**: ne komprenas nenion
**C**: komprenis nenio — **D**: ne komprenos multan

**11) Bedaŭrinde rompiĝis ...................., bonŝance ĝi estis malplena.**

**A**: botelo da konjako — **B**: du boteloj de konjako
**C**: botelo de konjako — **D**: du boteloj da konjako

**12). Okcent kvardek tri mil sepcent ses estas : .................... .**

**A:** 853670 — **B**: 834607
**C**: 843706 — **D**: 843607

**13) La bakota pano estas..................................... .**

**A:** pano, kiun oni jam bakis **B:** homo, kiu bakos panon
**C:** pano, kiun oni baldaŭ bakos **D:** homo, kiun bakos la pano

14) **Mi naskis mian filon(,) ......................... .**

**A:** post du tagoj **B:** la 31an de septembro
**C:** dum mi estis en Londono **D:** antaŭ du jarojn

15) **Mia patrino naskiĝis .................................................. .**

**A:** la unua de oktobro en 1937 **B:** la unuan de oktobro en 1937
**C:** la unuan de oktobro 1937 **D:** la unua en oktobro de 1937

16) **Glaciaĵon mi manĝas ................................................. .**

**A:** per kulereton el bovlo **B:** kun batita kremo
**C:** kun kulereto el bovlon **D:** per batita kremo

17) **En Svislando bona horloĝo kostas ..................................... .**

**A:** ducent svisajn frankojn **B:** en ducent svisajn frankojn
**C:** ducent svisa franko **D:** ducent svisa frankojn

18) **Dum somero mi preferas ..................................................... .**

**A:** ripozi al labori **B:** ripozi kiel labori
**C:** ripozi ol labori **D:** ripozi kiom labori

19) **Bedaŭrinde li ne diris, ......................................................... .**

**A:** ke kiam li venos **B:** kiam li venos aŭ ne
**C:** ĉu kiam li venos aŭ ne **D:** kiam li venos

20) **Maria forgesis, ............................................ .**

**A:** ke kien ŝi metis sian sakon **B:** kie ŝi metis sian sakon.
**C:** kien ŝi metis sian sakon **D:** kien ŝi metis la sian sakon

21) **Mi skribis ......................................................... .**

**A:** por ke vi ne ekveturu morgaŭ **B:** por ke vi ne ekveturos morgaŭ
**C:** por ke vi ne ekveturus morgaŭ **D:** por vi ne ekveturos morgaŭ

**22) La patrino starigis la torton ......................... .**

**A:** en la mezon de la tablo **B:** en la mezon de la tablon
**C:** inter la du telero **D:** sur la tablotukon de la avinon

23) **Mia patro estas .......................................................... .**

**A:** 87 kilogramajn pesa **B:** 87 kilogrammojn peza
**C:** 87 jarojn alta **D:** 187 centimetrojn alta

**24) Mi forgesis diri, ke ………………………………….. .**

**A:** tion libron vi legu, ĉar ĝi estas legenda **B:** tiun libron vi legu, ĉar ĝi estas leginda
**C:** tion libron vi legu, ĉar ĝi estas legebla **D:** tiun libron vi legu, ĉar ĝi estas legema

25) **Mi esperas, ke la testo ................................................ .**

**A:** plaĉis al vi **B:** ne lacigxis vin
**C:** plaĉis al vin **D:** ne lacigis sin

**Formularo por la solvoj**

| | A | B | C | D |
|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | |
| 2 | | | | |
| 3 | | | | |
| 4 | | | | |
| 5 | | | | |
| 6 | | | | |
| 7 | | | | |
| 8 | | | | |
| 9 | | | | |
| 10 | | | | |
| 11 | | | | |
| 12 | | | | |
| 13 | | | | |
| 14 | | | | |
| 15 | | | | |
| 16 | | | | |
| 17 | | | | |
| 18 | | | | |
| 19 | | | | |
| 20 | | | | |
| 21 | | | | |
| 22 | | | | |
| 23 | | | | |
| 24 | | | | |
| 25 | | | | |

## *Konsiloj por la uzo de gramatikaj testoj*

- La testojn mi uzis precipe por kontroli la nivelon de la lernantoj kaj tiel scii kiuj gramatikaĵoj estas ankoraŭ ne klaraj, kaj ne por turmenti miajn disĉiplojn!
- Similaj testoj servis bone kiam mi komencis labori kun grupo, persono, por mi nekonata sed jam havanta certan nivelon de lingvokonoj.
- La testdemandojn mi klopodas kompili tiel, ke ili enhavu kiel eble plej multe da tiklaj gramatikaĵoj. Alia celo estas ke dum la solvado se la lernanto volas bone respondi al unu punkto ĝenerale renkontu pli ol unu problemon.
- La testoj enhavas 25 punktojn, ĉar tiel mi tuj povas konverti la rezulton je procentaĵoj. /Ĉiu bona solvo valoras 4 %./
- Por la rapida kontrolo mi antaŭe preparas sur travidebla foliospeco la skemon kun solvoj, kaj tranĉas ĝin je la dekstra flanko de la tabelo. Precize metante la travideblan skemon sur la lernantan formularon, sur la dekstra flanko mi povas marki la bonajn solvojn sur la folio de la lernanto. /Atentu, ke vi metu ĝin en la bona direkto!/
- Mi uzas multajn tiajn testojn, do la travidebla slipeto surhavu krom la solvoj ankaŭ la komencan frazon de la koncerna testo, tiel mi ne miksas ilin.
- En aparta dokumento de la lerniloteko, nomita „***Testoformularoj***" vi trovas folion kun kvar tabelkolumnoj. Printu ĝin kaj se vi uzas kun via grupo nur unufoje tian teston distranĉu la kolumnojn /atentu lasi spacon je la dekstra flanko por viaj korektonotoj!/ kaj disdonu ilin al la studentoj. Se vi volas plurfoje uzi tiajn testojn, prefere konservu unu tutan folion por unu lernanto, skribigu lian/ŝian nomon sur la folio kaj ĉiam notigu kiam kiun teston ili solvis. Vi mem skribu la procentaĵojn sub la skemo, tiel bone kompareblas la rezultoj.
- Ĉe grupa laboro la lernantoj finas la solvadon de la testo ne samtempe. Kiam iu finis, signalu al vi, vi povas aliri kaj ene de 1 minuto kontroli kaj dekstraflanke „minuse" indiki la problemajn punktojn. Dum vi korektas la solvojn de la aliaj, la sama studento povas revizii sian proponon kaj ne per x-oj, sed nun per punkto ekz. elektu alian solvon. Tiel ili ne enuas dum la malpli rapidaj ankoraŭ laboras.
- La tuja korektado kaj dono de la rezultoj havas tre motivigan forton.
- Ĉe la fino bv. laŭdemande trairi kune la teston, halti ĉe ĉiu punkto kie leviĝis problemo kaj pritrakti tiun en la grupo. Kelkfoje daŭras longe kaj donas bonan elirpunkton al detala gramatika ripetleciono.

**Solvo por la gramatika testo**

**„Mia amiko lernas....”**

| | A | B | C | D |
|---|---|---|---|---|
| 1 | | | X | |
| 2 | | X | | |
| 3 | | X | | |
| 4 | | X | | |
| 5 | X | | | |
| 6 | | | X | |
| 7 | | | X | |
| 8 | | | | X |
| 9 | | | | X |
| 10 | X | | | |
| 11 | | | X | |
| 12 | | | X | |
| 13 | | | X | |
| 14 | | | X | |
| 15 | | | X | |
| 16 | | X | | |
| 17 | X | | | |
| 18 | | | X | |
| 19 | | | | X |
| 20 | | | X | |
| 21 | X | | | |
| 22 | X | | | |
| 23 | | | | X |
| 24 | | X | | |
| 25 | X | | | |